UNIVERSITY OF AMSTERDAM

UvA-DARE (Digital Academic Repository)

Interlingvistiko retrospektive kaj prospektive

Panoramo pri la originala kontribuo de Fabrizio Pennacchietti al la disciplino

Gobbo, F.

DOI
10.13135/1825-263X/8255

Publication date
2023

Document Version
Final published version

Published in
Kervan

License
CC BY

Link to publication

Citation for published version (APA):
Gobbo, F. (2023). Interlingvistiko retrospektive kaj prospektive: Panoramo pri la originala kontribuo de Fabrizio Pennacchietti al la disciplino. *Kervan*, *27*(2), 325-336. https://doi.org/10.13135/1825-263X/8255

General rights
It is not permitted to download or to forward/distribute the text or part of it without the consent of the author(s) and/or copyright holder(s), other than for strictly personal, individual use, unless the work is under an open content license (like Creative Commons).

Disclaimer/Complaints regulations
If you believe that digital publication of certain material infringes any of your rights or (privacy) interests, please let the Library know, stating your reasons. In case of a legitimate complaint, the Library will make the material inaccessible and/or remove it from the website. Please Ask the Library: https://uba.uva.nl/en/contact, or a letter to: Library of the University of Amsterdam, Secretariat, Singel 425, 1012 WP Amsterdam, The Netherlands. You will be contacted as soon as possible.

UvA-DARE is a service provided by the library of the University of Amsterdam (https://dare.uva.nl)

Download date:20 Apr 2024

Interlingvistiko retrospektive kaj prospektive

Panoramo pri la originala kontribuo de Fabrizio Pennacchietti al la disciplino

Federico Gobbo

Interlinguistics is one of the oldest branches of Linguistics; nonetheless, its definition and area of application struggles to be accepted by the academe, since its beginning, because it breaks a seldom admitted taboo of linguists, i.e. the fact that even if the capability of languages is natural in the sense that human beings are biologically programmed to learn languages, the languages they are learning are defined by the societies they happen to live in. Therefore, ultimately, all human languages should not be defined as 'natural' but as 'ethnic', 'national', in case they are consciously planned – in the sense of language planning – by ethnic or national groups, or 'ethic', 'international', or other adjectives, if defined and shaped by communities of practice that are not identifiable with an ethnic or national group, such as, for example, the Esperantists. This contribution illustrates the consequences of this epistemological and ethical standpoint, elicited from the vast rather often neglected literature in interlinguistics that Fabrizio Pennacchietti published in his long and fruitful academic career.

Keywords: interlinguistics, Esperanto studies, Esperantology, language typology.

1. La pudingo de la pruvo[1]

En sia enkonduko al la fundamenta volumo pri interlingvistiko redaktita de Schubert (1989), André Martinet, kiu kunlaboris kun IALA dum la planado de la prototipoj de la lasta serioza rivalo de Esperanto iam ajn proponita, t.e. *Interlingua*, retrospektive al sia periodo kiel direktoro de IALA malfermas sian pripensadon titoligita 'La pruvo de la pudingo' tiel:

[1] Ĉi tiu fakartikolo baziĝas ĉefe sur la ĵus publikigita artikolo *Ses difinoj serĉantaj fakon* (Gobbo 2023b), kaj prezentita en la angla kadre de la simpozio *Language planning and planned languages* en la Esperantomuzeo de Vieno, la 29an de oktobro 2019, kaj en la itala sub la titolo *Sei definizioni in cerca di una disciplina* ĉe la Moŝta Kolegio Borromeo de Pavio, la 2an de aprilo 2020. Itala versio de la kontribuo aperis sub la titolo *L'interlinguistica alle soglie degli anni Venti del Duemila* (vidu Gobbo 2019).

Tamen, verkante la artikolon mi decidis elesplori la kontribuaron de Fabrizio pli esplicite. Ties aldono al la difino kaj ellaboro de interlingvistiko estas bedaŭrinde ofte neglektata, eĉ fare de fakuloj, kun la rimarkinda escepto de Davide Astori. Ĉiuj citaĵoj en lingvoj alia ol Esperanto aperas piednote en la originala versio.

> Ĝis antaŭ ne multe, prezenti artefaritan lingvon kiel artefaritan estintus la plej malfeliĉa afero kiun oni povus diri pri ĝi. La inventintoj kaj subtenantoj de planlingvoj, ekde Volapuko, akurate evitis substreki tiun econ kaj male evidentigis la internacian kaj helpan karakteron de siaj produktoj. [...] Tial interlingvistoj, t.e., tiuj kiuj engaĝiĝas en la kreado kaj disvastigo de planlingvoj, evitis la terminon artefarita, havante ankoraŭ la tendencon sin konformi pli al la internaciaj kutimoj ol la esenca originaleco. Oni do adoptu kaj eltenu la mallongan kaj tujpretan terminon planlingvoj, eĉ se harfendistoj povus argumenti, ke tia termino povintus aplikiĝi al tiaj naciaj lingvoj kiuj ricevis iuforme planadon.[2]

En la jaro 1989 la Berlina muro falis, kaj interlingvistiko, estante duonrekonita kaj okcidente kaj oriente de la tielnomata Fera Kurteno, estis devigita transformi sin alian fojon. Pli ol tuberon en la afero—tiel mi adaptas la tipe anglan esprimon 'la pruvo de la pudingo'—kion Martinet reale ofertis laŭ mi estis tute male pudingo de la pruvo. Ekstermetafore, interlingvistoj ne sukcesis trovi ampleksan interkonsenton pri la kerno kaj la periferio de sia disciplino post preskaŭ 70 jaroj de ekzisto, ekde la invento de la franca vorto *interlinguistique* fare de Meymans (1911), kies difino estis pli malpli tradukita laŭvorte fare de Jespersen dudek jaroj poste (1931) sen ĉia ajn evoluo, kvazaŭ la Ido-skismo kaj la unua mondmilito pasintus vane en la mondo. Eĉ la dua mondmilito ne malfermis la okulojn al la fakuloj pri interlingvistiko, kiuj ne sukcesis aktualigi interlingvistikon, je la punkto ke la sama Martinet en 1946 lamentis, ke:

> La areo de la interlingvistika kreado estas, laŭ multaj homoj, ejo en kiu la senbrida fantazio de senrespondecaj amatoroj laŭnecese restas libere kuranta.[3]

Klare, la origina propono de Meysmans (1911) unue kaj ĉefe Jespersen (1931) havi interlingvistikon kiel tute memstaran fakon tute fiaskis post la sinko de *Interlingua*, kiel agnoskite fare de Martinet (1989) en sia enkondukaj vortoj menciitaj malferme de ĉi tiu fakartikolo. Intertempe, la gepatra disciplino, lingvistiko, profunde transformiĝis, aparte pro la influo de Noam Chomsky (Harris 2021), kaj

[2] Originalo en la angla: "Not so very long ago, presenting a language as artificial would have been the worst possible thing you could have said about it. The inventors and promoters of planned languages, from Volapük onward, carefully avoided that epithet and stressed the international and auxiliary character of their products. [...] Yet interlinguists, i.e., those who are involved in the creation and diffusion of planned languages, avoid the term artificial, being still more inclined to stress their conformity to international habits and standards than their intrinsic originality. Let us resort then to the short and handy term planned languages, although quibblers might argue that it could also apply to such national languages as have been submitted to some sort of planning" (Martinet 1989: 3).

[3] Originalo en la franca: "le domaine de la création interlinguistique reste pour beaucoup celui où la fantaisie débridéee d'amateurs irresponsable se donne nécessairement libre cours" (en Blanke 2018: 3).

konsekvence la aplikaj partoj de lingvistiko same devigatis adaptiĝi al la nova situacio. Unu el ili estis la nova branĉo *language planning*, lingvoplanado, laŭ la nova vortigo de la Einar Haugen, priskribante la socilingvistikan situacion de la moderna norvega, kiu estas:

> La agado pretigi normigan ortografion, gramatikon, kaj vortaron por la orientiĝo de verkistoj kaj parolantoj apartenantaj al nehomogena komunumo.[4]

Sufiĉe ironie, la pioniroj de lingvoplanado ne konsideris adekvate la historion de interlingvistiko antaŭ la dua mondmilito, ĉar evidente la difino de lingvoplanado perfekte taŭgus por Volapuko, Esperanto, Ido kaj la aliaj rivaloj: la lingvoplananto devas pretigi verke la norman varion de lingvo, inkluzive de normiga gramatiko, vortar(et)o kaj ekzemplaj tekstoj, por faruta ne-homogena lingvokomunumo, samkiel en la okazo de naciaj lingvoj kiel la norvega aŭ minoritataj lingvoj kiel la frisa, kun la grava diferenco, ke, en la ĉi-lasta okazoj la lingvokomunumo jam ekzistas aŭ ekzistis (ekzemple kiam oni pritraktis la kornovalan aŭ siatempe la hebrean; en ĉi tiuj situacio oni parolas pli prudente pri revigligo, kiel ekzemple Zuckermann 2020). Estas escepto nur Valter Tauli (1968), kiu enkadrigis interlingvistikon kiel la internacian nivelon de lingvoplanado, super la nacian (ekzemple la norvegan, la hebrean) kaj la regionan (ekzemple la frisan, la kornovalan):

> Interlingvistiko povas esti difinita kiel scienco pri planado de IL [Internacia Lingvo], aŭ, pli precize, la branĉo de la TLP [Teorio pri Lingvo-Planado] kiu esploras la principojn, metodojn kaj taktikojn plani IL. Per IL mi celas universalan lingvon [tiele!] uzendan kiel komunikilon fare de individuoj apartenantaj al malsamaj lingvokomunumoj.[5]

Bedaŭrinde la alvoko de Tauli restis por la plejmulto voĉo krianta en la dezerto. Parte, la kialo estas en la fortuno de lingvoplanado kiel branĉo de aplika lingvistiko, kiu ju pli pasis la tempo des pli ĝi estis alproksimigita al lingvopolitiko, ĝis la punkto, ke oni komencis paroli pri lingvopolitiko kaj -planado (LPP) kiel unuigita branĉo; do, dum lingvoplanado restis en la koro de la disciplino, la atento iris pli al la politikaj aspektoj ol al specifa lingvoinĝeniera agado por adapti la materialon de la lingvo al la

[4] Originalo en la angla: "the activity of preparing a normative orthography, grammar, and dictionary for the guidance of writers and speakers in a non-homogeneous speech community" (Haugen 1959: 8).

[5] Originalo en la angla: "Interlinguistics can be defined as the science of IL [International Language] planning, or more precisely, the branch of TLP [Theory of Language Planning] which investigates the principles, methods and tactics [sic!] of IL planning. By IL is meant a universal language to be used as a means of communication by individuals belonging to different language communities" (Tauli 1968).

komunumoj (Gobbo 2023a). Do, la marĝeniĝo de lingvoplanado en la dufaca LPP kaŭzis la marĝeniĝon de interlingvistiko. Fakte, male al la malfrua alvoko de Detlev Blanke (2003), laŭ kiu "lingvopolitikaj aspektoj estas gravaj elementoj de moderna interlingvistiko" kvazaŭ interlingvistiko estus la ombrela fako, veras, ke interlingvistiko estas nur apendico de lingvoplanado. La sama Tauli (1968) verkis apartan ĉapitron pri tiu rilato kiu estas pli mallonga kaj teoria ol konkreta, kaj evidente estas interlingvistiko kiu partas lingvoplanadon, ne inverse. Barandovská-Frank (1995) raportas diversajn interpretojn de la disciplino, kiuj finfine ne havis ajnan influon en la lastaj 20-30 jaroj, ĉar ili ne formis skolon. Szerdahelyi (1979) alvokis fakulojn por "apartigi novan disciplinon, kies tasko estu ĝuste la solvado de la interlingva problemo." Tio eĥas la perspektivon de W. J. Manders (1950), kiu komparis strukture Esperanton kaj ĉefaj rivaloj. Post la falo de la Berlina muro, nur unuiĝinta Germanio vere restis la bastionon de interlingvistiko ĉar ekzistis—kaj ekzistas—GIL, *Gesellschaft für Interlinguistik*, la asocio por interlingvistiko, laŭ kiu interlingvistiko estas la fako pri "internacia parola komunikado, laŭ la aspektoj politika, lingvistika, ekonomika, kultura, kaj aliaj; kerna punkto de la laboro estas fakte la strukturo kaj funkciado de planlingvoj (ekz. Esperanto)."[6]

2. La itala skolo de interlingvistiko ekde Bausani al Pennacchietti

En sia fundamenta libreto pri la intersekcio inter lingvo kaj inventado, publikigita unue en la germana (1970) kaj poste en la itala (1974), Alessandro Bausani argumentas, ke lingvistoj ne okupiĝas ĉefe pri lingvaj signoj sed pri iposignoj (t.e. subsignoj), alivorte nur funkciaj elementoj de la signoj. Plenaj signoj estas agosignoj, kiel ekzemple 'jes', 'ne,' 'dankon', kiujn lingvistoj pritraktas malvolonte. Pro tio, la psikologiaj, magiaj, kaj religiaj uzoj de la lingvo, normale ne eniras la lingvistikan esploradon, kaj plani lingvon el nenio estas rompo de tabuo kiu finfine estas la kaŭzo de la marĝeniĝo de interlingvistiko. Jen la tubero en la afero, laŭ Bausani: planlingvoj hontas pri sia origino, kvazaŭ ĝi estu peka, kaj streĉe klopodas akceptigi sin fare de la aliaj lingvoj kaŝante sin malantaŭ ŝlosilaj vortigoj kiel 'internacia helplingva komunikado', 'apriora kaj aposteriora', k.a.

Konsekvence, la nura maniero savi interlingvistikon estas inversigi la perspektivon: estu la lingvoinventado la kerno de la disciplino, senrigarde al la funkcio kaj celo kiuj estas en la menso de la lingvoinventinto. Kontraste al la germana skolo, do, kaj la multaj fakuloj de ĝi influataj, Bausani kaj la

[6] El la retejo web.interlinguistik-gil.de, laste kontrolita la 13an de julio 2023: "Gegestand der Interlinguistik ist die internationale sprachliche Kommunikation. Die Gesellschaft für Interlinguistik e. V. (GIL) untersucht diese unter politischen, linguistischen, ökonomischen, kulturellen u. a. Aspekten. Schwerpunkt ihrer Arbeit sind dabei die Struktur und Funktion von Plansprachen (wie z. B. Esperanto)."

malgranda—iom izolata, oni koncedu tion—itala skolo baziĝas je la esplorado de la strukturo de la lingvo ne kiel rezulto sed kiel procezo. En la vortoj de Bausani:

> necese tuj alvenas la bezonon skizi unue eblan teorian tipologion de lingva inventado [...] Alivorte, eblas inventi lingvojn ĉefe aŭ nur esprimivajn, cele al poezio aŭ ezoteraĵoj, ofte malregulaj, malfacilaj, 'originalaj', aŭ lingvojn cele al pli ampleksa internacia interkompreno (Esperanto kaj la samspecaj).[7]

Fabrizio Pennacchietti havis, inter la aliaj, Alessandro Bausani kiel unu el siaj mentoroj, kaj lia influo sur sia aliro al interlingvistiko estas tute klara. Alivorte, la laboro pri interlingvistiko komenciĝis ekde la aliro de Bausani por disvolviĝi en originala maniero, sen devojiĝi de la sulko de la menciita mentoro. En sia mallonga sed malprave neglektata fakartikolo pri interlingvistiko en la itala akademio, Pennacchietti (2011), post la devigata omaĝo al la plej citita difino de Jespersen (1931), inversigas la direkton de la disciplino menciante, ke kaj Graziadio Isaia Ascoli kaj Alessandro Bausani inventis adoleske esprimivajn lingvojn ludcele uzindajn nur inter geamikaj rondoj. Ili estas respektive la Askola kaj la Markuska; ĉi-lasta evidente estas kreitaĵo de Bausani (pri la Markuska, vidu Gobbo 1998). Jen la du ĉefaj partoj de la prezento de interlingvistiko laŭ Pennacchietti:

> En interlingvistiko distingiĝas du aliroj: (a) unu historia kaj retrospektiva, cela al priskribo, klasifikado kaj komparado de la planlingvaj projektoj (gestolingvoj, pazigrafioj, pazilalioj, aprioraj kaj aposterioraj lingvoj), ekde Komenio, Wilkins, Kartezio kaj Leibniz, tra Graziadio Isaia Ascoli kaj Giuseppe Peano ĝis Orwell kaj la modernaj hom-maŝinaj kodolingvoj, kaj (b) la alia teoria kaj perspektiva, cele al trovi la plej efikan kaj racian solvon al la problemo de la internacia lingva komunikado, alternative al la tielnomata 'lingvara darvinismo'. [...] Ekster la esperantista komunumo la termino 'lingvoplanado' estas pli ofte uzata refere al la normigoj de tielnomataj 'naturaj' lingvoj, t.e. etnaj aŭ historiaj: konata estas la fakto, ke ĉiuj 'naturaj lingvoj', aparte se unue estas ankaŭ uzataj konsiste skribe kaj verke kaj due se ili oficialiĝas en iu ŝtato, enhavas diversnivele elementojn kiujn oni povas nomi 'artefaritaj', tiom en la elekto de la skribsistemo, kiom en la ortografio, leksiko, kaj gramatikaj normoj.[8]

---

[7] Originalo en la itala: "si impone così fin dal principio la necessità di schizzare preliminarmente una possible tipologia teorica dell'inventività linguistica [...] Potrebbero cioè inventarsi lingue puramente o soprattutto espressive, a scopi poetici ed esoterici, spesso irregolari, difficili, 'originali' [...] oppure lingue a scopi di più ampia intercomprensione internazionale (l'esperanto e le sue congeneri)" (Bausani 1974: 12-13).

[8] Originalo en la itala: "Nell'interlinguistica si distinguono due indirizzi: (a) uno storico e retrospettivo, mirante alla descrizione, alla classificazione e allo studio comparativo dei progetti di lingue pianificate (lingue gestuali, pasigrafie, pasilalie, lingue 'a priori' e lingue 'a posteriori'), a partire da Komensky (Comenius), Wilkins, Cartesio e Leibniz, passando da Graziadio

La unua distingo ene de interlingvistiko inter retrospektiva kaj perspektiva aliro laŭ la kono de la aŭtoro—eble surprize al la leganto—estas tamen tute originala kaj pensoveka. La retrospektiva aliro estas ellaboro farenda per "benediktana diligento", por uzi esprimon de la ĉefa fakulo pri Volapuko de la pasinta jarcento, Reinhard Haupenthal. Ofte aperas nekonata eta publikaĵo de aŭtoro de planlingvo kiu mem pagis la kostojn de publikigo de la projekto sen ricevi la atenton de la publiko siatempe, kaj do estante forgesita dum jardekoj. Sendube publikigi kritikajn eldonojn aŭ analizojn de tiuj forgesitaĵoj estas fonto de intereso al historiistoj de la ideoj kaj aparte de la scienco. Bona ekzemplo estas la anglalingva volumo de Michael Gordin (2015) pri la scienca babelo, t.e. la elekto de la lingvo por publikigi originalajn sciencajn rezultojn.

Trarigardante la liston de liaj publikaĵoj, ŝajnas al mi, ke Pennacchietti—kies ĉefa esplorintereso estis en la kampo de orientistiko ĝenerale kaj aparte semidistiko, oni koncedu tion sen ajna dubo—pli interesiĝas al la perspektiva aliro. En la citaĵo esperantigita supre oni povas inkluzivi la lingvopolitikan parton kiu koncernas planlingvojn, aparte Esperanton.[9] Certe la katedro en la Universitato de Torino estis la pinto de la ĉeesto de interlingvistiko kaj esperantologio en la itala akademia kunteksto, almenaŭ en la lasta jardeko de la pasinta jarcento kaj la unua jardeko de la nuntempa jarcento.[10] Tamen, la laboro de Pennacchietti kadre de interlingvistiko ne estis nur formala aŭ instrucela. La difino de Pennacchietti pri interlingvistiko resumas tiun de Bausani (1974: 4):

Isaia Ascoli e Giuseppe Peano fino a Jespersen, Orwell e i moderni linguaggi uomo-macchina, e (b) un indirizzo teorico e prospettivo mirante alla soluzione più efficace e razionale possibile del problema della comunicazione linguistica internazionale, in alternativa al cosiddetto "darwinismo linguistico". [...] Al di fuori della comunità esperantista il termine 'pianificazione linguistica' fa più spesso riferimento alle misure normative approntate nei confronti di una lingua cosiddetta 'naturale', ossia etnica o storica: è noto infatti che tutte le lingue 'naturali', soprattutto se sono in primo luogo lingue scritte e se rappresentano la lingua ufficiale di uno Stato, contengono in diversa misura elementi che potremmo definire 'artificiali', e ciò tanto nella scelta del sistema di scrittura, quanto riguardo all'ortografia, al lessico e alle norme grammaticali. Nel caso delle grammatiche regolarizzate la linea di demarcazione tra lingue 'naturali' e lingue 'pianificate' come l'esperanto, che a torto viene definito 'artificiale', risulta spesso assai sottile. Avendo appreso l'esperanto quand'ero quattordicenne, posso per certi versi definirmi bilingue. Dopo quattordici anni d'insegnamento universitario di *Interlinguistica*, mi piace definire tale disciplina come "la scienza dell'intervento cosciente dell'uomo sul linguaggio" (Pennacchietti 2011: 17-18).

[9] Multaj Esperanto-parolantoj iom surface, se mi rajtas mallonge diri anekdote, konsideras interlingvistikon Troja ĉevalo por enkonduki Esperanton en akademiajn rondojn kaj tiamaniere altigi ĝian prestiĝon. Tio nenie ajn favoris interlingvistikon akademie kaj nek Pennacchietti nek aliaj seriozaj fakuloj iam ajn kunpartigas tian aliron, laŭ la scipovo de la aŭtoro.

[10] La posteulo de Fabrizio Pennacchietti estis, dum iom da jaroj, la siatempe mentorito Federico Gobbo, kiu instruis en la Universitato de Torino laŭkontrakte antaŭ ol iĝi speciala profesoro pri Interlingvistiko kaj Esperanto en la Universitato de Amsterdamo. Dum iom da jaroj li instruis en ambaŭ universitatoj. La akademian jaron de la kovima monda krizo la katedro iniciita de Fabrizio Pennacchietto ĉesis ekzisti.

> La nura novaĵo [de la volumo] konsistas en tio ke ĝi estas propono – miascie la unua – krei historion kaj tipologion ĝeneralajn de la *nenatura lingvado*. [...] Ekzistas, miaopinie, eĉ en siaj diversaj fenomenologiaj aspektoj, unueco en la fenomeno de artefara lingva kreado, unueco kiu permesas, ke oni studu per la sama rigardo kaj la aŭtoron de la mistera islama balaibalana, kaj la inventinton de la lingvo de primitiva sekreta societo kiel la sigia de la dogonoj, kaj la adoleskanton kiu inventas sian lingvon, kaj la frenezulon kiu lingvadas unuavide sensence, kaj pastron Schleyer, iniciatoron de Volapuko, kaj doktoron Zamenhof kaj aliajn el iliaj kolegoj.[11]

Kohere al tio, kaj danke al sia vasta konaro pri semidaj lingvoj, Pennacchietti komencis tre frue kompari la prepoziciajn sistemojn de hindeŭropaj kaj semidaj lingvoj; fakte prepozicio lingvotipologie estas rimarkinda lingva objekto, kiel jam en Pennacchietti (1976: 137):

> Esperanto, samkiel relative malmultaj lingvoj, pleje apartenantaj al la hindoeŭropa kaj hamidosemida lingvogrupoj, posedas la gramatikan kategorion de prepozicio.

Prepozicioj iĝis pli kaj pli la trakonilo por kompari strukture lingvojn tipologie. Kiel en la bestaj kaj homaj korpoj estas la artikoj kiuj donas la strukturon kaj la limojn de la moveblecoj, tiel en "relative malmultaj" lingvoj estas la prepozicioj kiuj donas la strukturon kaj la limojn de la variecoj. Prepozicioj laŭ Pennacchietti ludas la rolon kiun ludis siatempe la baza vortordo (subjekto, verbo, objekto) por Greenberg—nehazarde lingvisto kaj antropologo specialigita en afrikaj lingvoj—kiam li revoluciis lingvotipologion en 1966.

La teoria kadro tiam estis la 'korelacia gramatiko', kiu estis ege nova (vidu Blake 1990 por definitiva priskribo); ĝia fundamenta nocio estas la asimetrio inter du lingvaj objektoj, nocio kiu havas ankaŭ kognan bazon (Talmy 2000), kaj prepozicioj agas kiel indikiloj de tiu ĉi asimetrio. En la vortoj de Pennacchietti (1976: 140):

> Inter la du termoj de korelacio oni distingas komencan (K) termon kaj finan (F) termon. Ekzemple, la segmenton *soifo je paco* oni povas konsideri kiel la lingvan projekcion de semantika koncepta korelacio, kie la ideo de la determinato soifo rolas kiel K-termo kaj la

[11] Originalo en la itala: "La sua unica novità [consiste nell'essere un tentativo – a mia conoscenza il primo – di fare una storia e una tipologia generali del verbigerare non naturale. [...] Esiste, a mio parere, pur nei diversi aspetti fenomenologici, una unità nel fenomeno del creare linguistico artificiale, che permette di studiare sotto lo stesso punto di vista sia l'autore del misterioso balaibalan musulmano, sia l'inventore della lingua di una società segreta primitiva come il sigi dei Dogon, sia l'adolescente che inventa la sua lingua, sia il folle che verbigera in modo apparentemente senza senso, sia mons. Schleyer inventore del volapük, sia il dottor Zamenhof e altri loro colleghi" (Bausani 1974: 4).

> ideo de la komplemento paco rolas kiel F-termo. Memkompreneble la prepozicio ja funkcias kiel korelaciindikilo.

Lastanalize, la interlingvistika aliro de Pennacchietti kuraĝis kompari planlingvojn kiel Esperanton aŭ la Markuskan de la adoleskanto Bausani al "tiel-nomataj 'naturaj' lingvoj" sen ajna problemo aŭ honto. Male la aliroj de multaj aliaj interlingvistoj, kies la nura komparo estas politika-socia, ĉefe komparis Esperanton kontraste al la angla en la tiel-nomata lingvafrankaa funkcio (ekz. Gobbo and Marácz 2021; Fiedler and Brosch 2018). Pro tio, gravas agnoski la originalecon en la aliro al interlingvistiko fare de Fabrizio, aliro kiu meritas pli kaj pli da atento kaj pluesploradon. Ni nun turnu nian atenton al la plej grava subbranĉo de interlingvistiko.

3. La aliro al esperantologio de Pennacchietti

Esperantologio estas la nura solida branĉo de interlingvistiko, simple ĉar Esperanto estas la socilingvistike plej grava planlingvo, alivorte la planlingvo plej uzata, kvante kaj kvalite. Pro tio Esperanto povas esti analizata interalie sub la lupeo de lingvotipologio.[12] Grava publikaĵo tiurilate estas Pennacchietti 1981, en kiu la aŭtoro argumentas, ke laŭ la vidpunkto de strukturo la lingvoinventinto de Esperanto, Ludoviko L. Zamenhof, planis lingvoprojekton kiu montras internan koherecon,

> ne [...] koktelo de diverslingvaj vortoj kaj esprimoj kaprice kombinitaj sur arbitra kanvaso, nek asepsa eksterpolaĵo de eŭropaj lingvoj, nek fine simpla produkto de imito kaj kompromiso [...] ĝi kapablas harmoniigi la postulojn de struktura simpleco, necesajn por vasta internacia uzo, kun la konservado de preciza tipologia stampo, nome tiu de la ĝermanaj kaj slavaj lingvoj de centra Eŭropo (Pennacchietti 1982: 92, 95).

Tamen, malgraŭ la sendubebla kultura eŭropeca fono de Esperanto, la influo de la semidaj lingvoj donas kelkajn nehindeŭropajn trajtojn al la internacia lingvo:

> Kun ILo [Internacia Lingvo, t.e. Esperanto] la semidaj lingvoj havas plue la komunan trajton, akordigi la adjektivon kun la koncerna substantivo, kaj la araba esprimas krome la kategorion de "akuzativo" de la nedifinitaj substantivoj kaj adjektivoj ne havantaj dualan finaĵon per la monemo *-an*, ku parte koincidas kun la akuzativ-monemo de Esperanto. Alia semida paralelo kun ILo estas la ekzisto de unuforma difina artikolo kaj la foresto de

[12] Propracele oni limiĝas ĉi tie nur al la kontribuo fare de Pennacchietti kadre de la tipologia klasifikado de Esperanto, alikaze la rezonlinio portus onin tre for.

> nedifina artikolo en la hebrea kaj la araba. Krom tio, ĉiam kiam evidentiĝas proksimuma paralelaĵo inter semida lingvo kaj Esperanto, tia paralelaĵo troviĝas ankaŭ en la hindeŭropaj lingvoj konataj de la Aŭtoro de ILo, dank' al la tipologia simileco inter la du lingvofamilioj, la semida kaj la hindeŭropa (Pennacchietti 1982: 94).

Notindas la metodologia aliro de Pennacchietti al la interlingvistika analizo de Esperanto (kaj de aliaj planlingvoj). Male al la etnaj aŭ historiaj lingvoj, kiam oni analizas la strukturon de aposteriora planlingvo, aparte se ĝi estas skemisma, oni devas komenci la analizon ekde la lingva repertuaro de la lingvoinventinto, kun aparta atento al ties ĉefaj lingvoj. L. L. Zamenhof parolis denaske la jidan kaj rusan, kaj do tipologiaj similaĵoj kun tiuj du lingvoj estas unuagradaj, ĉu konsciaj ĉu nekonsciaj, kompare al la similaĵoj kun lingvoj tute fremdaj al li, ekzemple la ĉina aŭ la indonezia, kiuj estas duagradaj. Flanke notite, la komparo inter Esperanto kaj ĝiaj historie plej gravaj rivaloj, t.e. Ido, Occidental/Interlingue, Novial, IALA Interlingua, montras klare, ke la direkto de interlingvistiko estis forpuŝi ĉiujn nehindeŭropajn trajtojn, kaj krome eĉ la slavajn, por alproksimi sin pli kaj pli al latinida prototipo, laŭ la vidpunkto de tipologio. Se la atako al Esperanto pri ĝia troa eŭropeco estas unu el la malmultaj kiuj havas iun bazon, la rivaloj aperas, fronte al la rigardo de nuntempuloj, eĉ pli eksmodaj. Alia kontribuo de Pennacchietti en la kampo de esperantologio estas rilata al lingvoinstruado en la lernejoj, ekzemple 1988. Kiel Esperanto utilas al lernado de la aliaj lingvoj? La respondo de la fakulo klaras: en bazlernejoj, la lernantoj nature rezonas analogie en la lernado de la lingvoj, kaj Esperanto respektas la analogion multe pli ol etnaj aŭ historiaj lingvoj. Ekzemple, la adjektivo de 'akvo' en Esperanto formiĝas per simpla ŝanĝo de la lasta vokalo, t.e. 'akva', ekzemple en la esprimo 'akva baseno' en la itala estas *bacino idrico,* kiu interalie samsonas kiel 'kiseto', vorto multe pli familiara al infanoj. Tiun koncepton Pennacchietti nomis, jam dum siaj lecionoj pri interlingvistiko en la 1990aj jaroj, 'lingva higieno' (persona observado; bedaŭrinde neniam publikigita). Esperanto reprezentas atingeblan sukceson en la lernado de aliaj lingvoj bazlerneje, sen lasi malantaŭe lernejanojn kiuj ordinare ne kutimas sukcesi lerneje.

Laste sed ne balaste, Pennacchietti ĉiam prezentis Esperanton ne nur sub la vidpunkto de interna lingvistiko, t.e. laŭ ĝia planado, strukturo, kaj funkciado (fonologie, morfosintakse, leksike) sed ankaŭ kiel kulturlingvo. La origina fono de la projekto de Zamenhof estis juda, sed Esperanto iĝis nejuda projekto. Pri la unua aspekto, menciindas lia libreto pri la komparo inter Zamenhof kaj Ben-Yehuda, la ĉefa arĥitekto de la novhebrea, publikigita origine en 1987. En la sama jaro, li donis atenton al la komparo inter Esperanto kaj minoritataj lingvoj; fakte Esperanto estas lingvo de minoritato sed ne minoritata lingvo, kaj ideologie ĝi povas ludi la rolon de konsciigilo kaj helpilo, ĉar parole Esperanto estas ĉiam, vole-nevole, elekto kun socipolitika aspekto (Pennacchietti 1987a).

4. Finaj rimarkoj

Malgraŭ la fakto, ke interlingvistiko kaj esperantologio ĉiam estis flanka esplorintereso kompare al orientistiko kaj semida filologio, la kontribuaro de Fabrizio Pennacchietti montras klarajn signojn de originaleco, en la sulko de la itala skolo iniciatita de Alessandro Bausani. La aŭtoro esperas, ke ĉi tiu artikolo kontribuos al ĝia videbligo kaj valorigo per pluaj studoj kaj esploroj en la disciplino.

Bibliografio

Barandovská-Frank, Věra. 1995. *Enkonduka lernolibro de interlingvistiko*. Sibiu: Editura Universităţii din Sibiu.

Bausani, Alessandro. 1970. *Geheim- und Universalsprachen: Entwicklung und Typologie*. Stuttgart–Berlin–Köln–Mainz: W. Kohlhammer.

Bausani, Alessandro. 1974. *Le lingue inventate: linguaggi artificiali, linguaggi segreti, linguaggi universali.* Roma: Ubaldini.

Blake, Barry J. 1990. *Relational grammar*. London: Routledge.

Blanke, Detlev. 2003. *Interlingvistiko kaj esperantologio: vojoj al la faka literaturo*. Esperanto-Dokumentoj 39E. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.

Blanke, Detlev. 2018. *International Planned Languages: Essays on Interlinguistics and Esperantology*. Edited by Sabine Fiedler and Humphrey Tonkin. New York: Mondial.

Brosch, Cyril Robert and Fiedler, Sabine. 2018. "Esperanto and Linguistic Justice: An Empirical Response to Sceptics." In: *Language Policy and Linguistic Justice,* edited by Michele Gazzola, Torsten Templin and Bengt-Arne Wickström, 499-536. New York, NY: Springer.

Gobbo, Federico. 1998. "Verbigerazione fantastica." *Italiano & Oltre* 3/4:151-154.

Gobbo, Federico. 2019. "L'interlinguistica alle soglie degli anni Venti del Duemila." In: *Dieci anni (2009-2019) di Premio "G. Canuto" per tesi di laurea in Interlinguistica ed Esperantologia*, edited by Davide Astori, 101-106. Parma: Athenæum.

Gobbo, Federico. 2023a. "Corpus at the Core: The Epistemology of Language Planning." In: *Epistemological and Theoretical Foundations in Language Policy and Planning*, edited by Michele Gazzola, Federico Gobbo, David C. Johnson and José A. Leoni de León, 73-99. London: Palgrave Macmillan.

Gobbo, Federico. 2023b. *"Ses difinoj serĉantaj fakon." Beletra Almanako* 46: 100-123. (https://www.beletraalmanako.com/boao/ba46/index.html)

Gobbo, Federico and Marácz, László. 2021. "Two Linguas Francas? Social Inclusion through English and Esperanto." *Social Inclusion* 9/1: 75–84.

Gordin, Michael. 2015. *Scientific Babel.* Chicago, IL: University of Chicago Press.

Greenberg, Joseph H. 1966. "Some Universals of Grammar with Particular Reference to the Order of Meaningful Elements." In: *Universals of Language*, edited by Joseph. H. Greenberg, 40-70. Cambridge, MA: MIT Press.

Harris, Randy A. 2021. *The Linguistics Wars: Chomsky, Lakoff, and the Battle over Deep Structure*. 2nd edn. New York, NY: Oxford Academic.

Haugen, Einar. 1959. "Planning for a standard language in Norway." *Psyche Anthropological Linguistics* 1/3: 8-21.

Jespersen, Otto. 1931. "A New Science: Interlinguistics." *Psyche* 11: 57-67.

Martinet, André. 1989. "The proof of the pudding ... Introductory note." In: *Interlinguistics – Aspects of the Science of Planned Languages*, edited by Klaus Schubert and Dan Maxwell, 3-5. Berlin–New York, NY: Mouton de Gruyter.

Meysmans, Jules. 1911. "Une science nouvelle". *Lingua Internationale* 1/8: 14-16.

Pennacchietti, Fabrizio A. 1976. "La prepozicia sistemo de Esperanto." *Esperantologiaj Kajeroj* 1: 137-153.

Pennacchietti, Fabrizio A. 1981. "Ne hindeŭropaj trajtoj de la Internacia Lingvo." *Paderborner Arbeitspapiere* 63: 92-95.

Pennacchietti, Fabrizio A. 1987a. *Due vite, due lingue (Yitzhak Perelman alias Eliezer Ben-Yehuda, 1858-1922, e Ludovico Lazzaro Zamenhof, 1859-1917*). Vercelli: Gruppo Esperantista Vercellese.

Pennacchietti, Fabrizio A. 1987b. "L'Esperanto e le lingue minoritarie." In: *Le lingue tagliate. L'Esperanto e le lingue delle minoranze etniche*, edited by Norberto Saletti, 29-31. Milano (*L'esperanto* n. 8/9, Agosto-Settembre 1987).

Pennacchietti, Fabrizio A. 1988. "Riflessioni sul valore pedagogico dell'insegnamento dell'esperanto". *Lingua Verde* (Periodico di cultura interlinguistica) 41: 3-7.

Pennacchietti, Fabrizio A. 2011. "L'Interlinguistica nell'Accademia italiana." *L'esperanto* 88/4: 17-18.

Talmy, L. 2006. "Cognitive Linguistics". In: *Encyclopedia of Language & Linguistics* (Second Edition). Ed. Keith Brown, 542-546. Amsterdam: Elsevier.

Tauli, Pauli. 1968. *Introduction to a theory of language planning* (Volume 6 of Acta Universitatis Upsaliensis: Studia Philologiae Scandinavicae Upsaliensia). Upsala: Almquist & Wiksell.

Zuckermann, Ghil'ad. 2020. *Revivalistics. From the Genesis of Israeli to Language Reclamation in Australia and Beyond*. Oxford: Oxford University Press.

Federico Gobbo, PhD in Computer Science at the University of Insubria, Varese, is Professor by special appointment of Interlinguistics and Esperanto at the University of Amsterdam, where he also teaches Multilingualism. His main research interest is Language Policy and Planning, in particular Interlinguistics and Esperanto, Studies, Contested Languages, Mobility and Multilingualism. He is also interested in Argumentation Theory and Philosophy of Information. He has recently published a monograph on *Epistemological and Theoretical Foundations in Language Policy and Planning* co-authored with Michele Gazzola, David C. Johnson, and José A. Leoni de Léon, Cham: Palgrave Macmillan, 2023.
Federico can be reached at: f.gobbo@uva.nl